



# BULTENO


DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 4

Julio/Aŭgusto 1964



## NI INVITAS

## AL SOLINGEN

Multaj el ni povas ĝui ankoraŭ sian someran libertempon. Sed jam nun estas zorgeme preparata la 8a jarkunveno de nia asocio, kiu okazos en Solingen de la 16a ĝis la 18a de oktobro 1964. La kongresurbo atendas pro sia favora situo (apud Köln) multnombbran viziton el en- kaj eksterlando. La sekvanta artikolo informas pri la karakterizaĵoj de la kongresurbo Solingen. Detaloj pri la programo estas sur paĝo 2.

Germana Esperanta Fervoĵista Asocio

Studento de geografio troviĝus en fatala situacio dum sia ekzameno, se li ne povus rakonti ion pri Solingen. Supozeble li konas la devenojn de niaj tranĉiloj kaj tondiloj laŭnome, sed kiuj estas la karakterizaĵoj de tiu urbo? Pri tio ni volas iomete babilu.

Sur la mapo Solingen estas ne malfacile trovebla. Ĝi situas sude de la Ruhr-regiono kaj oriente de la Rejn-rivero tie, kie apud la ebenaĵo leviĝas la unuaj montetoj de la Montara Lando en altitudo de ĉirkaŭ 250 metroj super la marni-

velo. Desur la montetoj oni ĝuas vastan rigardon super la ebenaĵon: maldekstre estas videblaj la sveltaj turoj de la konata katedralo en Köln, sekvas multnombraj kamenoj de la kemiaj uzinoj (BAYER) en Leverkusen. Kiu atente rigardas dekstren, rekonas la turdomojn en Düsseldorf.

Solingen estas konata kiel „urbo de klingoj“. La kaŭzo por tiu atributo estas klarigebla per la multspecaj klingoj (tranĉiloj, ponardoj, glavoj, spadoj, tondiloj, raziloj), kiuj estas produktataj en majstra maniero dum jarcentoj. La tradicia



metia diligenteco kaj la daŭre kreskanta industrio kaŭzis la mondfamon de Solingen. Ĝi estas urbo kun forta laboremo. De 173000 enloĝantoj laboras 73000 dumtage, el la ĉi lastaj 56,5% en la industrio. Tiu kvoto estas eksterordinare alta.

Kiel menciite Solingen estas industria urbo. Tamen la fremdulo ne opinias esti en tia urbo. Mankas la tipa aspekto kun fabrikoj, deponejoj aŭ tristaj kvartaloj. Ankaŭ la aero ne estas malbonigata per fiodoro. Tio estas la granda kaj okulfrapa surprizo por ĉiu vojaĝanto: en tiu urbo ne estas amaso da domoj, sed maldense konstruita komunumo sur relative vasta areo.

Dum la milito la kerno de la urbo tute detruigis. Nur kelkaj domoj restis starantaj. Poste la aspekto de la urbo evidente ŝanĝiĝis. Modernaj konstruaĵoj kiel esprimo de nia nuntempo kreis allogan panoramon. Metiistoj kaj arkitektoj laboras ankoraŭ diligente por forigi la lastajn ruinojn kaj novformi la urbon laŭ nunaj konceptoj.

La konstatebla esprimo por la kultura volo de la urbo estas la impona konstruaĵo, en kiu troviĝas la teatro, la koncertsalonego kaj la salonego por ĉambra muziko. Bedaŭrinde ne estos eble okazigi la aranĝojn de nia jarkunveno en tiu vere elstara konstruaĵo. Ni invitos niajn gastojn al la urba kvartalo Wald, kie la urba salonego estos je nia dispono. Tiu kvartalo estis memstara urbo ĝis la jaro 1929. Tie estas grandaj gisejoj, fabrikoj por seruroj kaj maŝinoj. Estas ankoraŭ menciinde, ke en Solingen-Wald ekzistas la plej grandaj entreprenoj por la produktado de metalaj skeletoj por ombreltoj.

Dum la milito Wald ne difektiĝis. Sekve konserviĝis multaj domoj konstruitaj laŭ la stilo de la Montara Lando. La blanka turo enmeze de la urbeto estas kvazaŭ ekkonilo de Wald, kiam oni venas el la ebenaĵo de la Rejno. La preĝejo, spite al sia aĝo de 150 jaroj, estas multe pli juna ol la turo kaj respegulas la prusan specifecon de la konstruinto Schinkel. Samkiel la kokidoj ĉirkaŭ la kokino, same grupiĝas la malnovaj dometoj de la trabfaka kaj ardeza konstrumaniero ĉirkaŭ la preĝejo. Jen estas videbla ankaŭ la kolorkombino nigra-blanka-verda, karakterizaĵo de la Montara Lando.

Nun estas parolita jam multe pri la urbo kaj ĝia ekonomio. Sed la bildo ne estus komplete, se ni ne dirus ion pri la ĉirkaŭaĵo de Solingen. Sen troigo oni povas diri, ke ĝi estas vere bela kaj bona refreŝejo por la multnombraj streĉe laborantaj homoj. La arbaroj estas grandaj kaj la valoj malvastaj. Al unu el la plejmulte vizitataj lokoj apartenas la akvobarejo, kiu liveras parton de la trinkakvo.

Apud la rivero Wupper leviĝas la kastelo Burg. Ĝi enhavas muzeon, kiu povas multon reprezenti el la tiea regiono. Egale, ĉu vi restos en la urbeto aŭ grimpos sur la kastelan monton, ĉiukaze vi ne pentos la viziton.

Sed sendube plej interesa estos por vi ĉiuj la fervoja ponto de Müngsten, sesdek jarojn aĝa kaj vera majstraĵo en la fako de la pontokonstruo. Ĝi havas longecon de 500 metroj kaj interligas per reloj la urbojn Solingen kaj Remscheid. Kiu interesiĝas iom pli pri la industrio, vizitos malnovan akriĝejon en la valo de la Wupper-rivero. Ĝi konserviĝis kiel historia monumento kaj gastigas malgrandan muzeon. Kiu havas apartajn turistajn dezirojn, skribu senĝene al „Städtisches Presse-, Verkehrs- und Werbeamt, 565 Solingen“. Tiu oficejo donas jam nun prospektojn, kiuj estos disdonataj dum la jarkunveno.

Kvankam Solingen estas industria urbo ne tre granda, ĝi havas proprajn belajojn. Se la vetero favoros la aŭtunajn tagojn de nia jarkunveno, certe vi ne pentos vian partoprenon.

W. Grass

### Programo de la GEFA-jarkunveno en Solingen 16. — 18. 10. 1964

#### 16a de oktobro:

- 11.00 Akcepto de jurnalistoj
- 12.00 Akceptejo malfermata en la stacidomo de Solingen-Ohligs
- 19.00 Kunveno de la GEFA-estraro

#### 17a de oktobro:

- Akceptejo malfermata la tutan tagon
- 9.00 Unua rondveturado tra la urbo
- 13.00 Komuna tagmanĝo en la restoracio „Stadt-saal“, Solingen-Wald
- 14.00 Laborakunsido de la GEFA-estraro kaj distriktkomisiitoj (nepublika)
- 14.00 Lingva ekzameno, skriba parto (nepublika)
- 17.00 Dua rondveturado tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵo
- 18.30 Komuna vespermanĝo en „Stadt-saal“, Solingen-Wald
- 20.00 Distra vespero kun danco

#### 18a de oktobro:

- 9.30 Lingva ekzameno, buŝa parto (publika)
- 11.00 Filmoj, lumbildoj kun sonbendo
- 13.00 Komuna tagmanĝo

Atentu: Eksterlandanoj petu aliĝilon ĉe: Germana Esperanta Fervoja Asocio, sekretario (s-ino Kruse), 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6.



## 8. Jahresversammlung in Solingen 16. — 18. Oktober 1964

### Anmeldeschluß

30. September 1964

### Anmeldevordrucke

Ab August erhältlich bei den Bezirksbeauftragten oder beim GEFA-Sekretariat.

### Beitrag

1,50 DM, vorauszahlbar auf Postscheckkonto Köln Nr. 1802 08 zugunsten Wilhelm Grass, Solingen-Ohlgs.

### Kongreßgebäude

Staatsaal, Solingen-Wald, 10 Minuten vom Bahnhof Solingen-Ohlgs entfernt. Onnibusverbindung mit Linie 2 bis Haltestelle „Rathaus“.

### Korrespondenzanschrift

Bl Grass, Bautechnisches Büro — T 61 —, Bundesbahndirektion Wuppertal.

### Sprachprüfungen

Auch in diesem Jahr werden wiederum Sprachprüfungen abgenommen. Anmeldungen umgehend erbeten an: BOAmtm Dr. Lang, Prüfungsamt bei der Bundesbahndirektion Frankfurt (Main) Basa 955/1501.

### Meritplena membro 65 jara

La 23a de julio 1899 estis la tago, kiam nia membro, kolego Daniel Jäger, faris la unuan krion en tiu ĉi mondo. Neniĉiam estis lia maniero, fanfaroni aŭ eĉ paroli pri siaj propraj agadoj kaj sukcesoj. Ni scias, ke li eĉ okaze de tia okulfrapa naskiĝtago ne deziras aŭdi laŭdojn. Ni tamen prenas al ni la permeson, direkti niajn sincerajn, varmajn bondezirojn al nia jubileo — naskiĝtago ja ankaŭ estas jubileo — kaj ligas al ili nian profundan dankon pro la daŭra, valora, senbrua laborado, kiun li de jaroj faras.

De 1952 li estas membro de nia asocio. En multaj IFEF-kongresoj lia simpatia ĝentileco havigis al li multe da amikoj el ĉiuj landoj. Ĉiam li estis preta por helpi, kiam helpo estis necesa. En la jaro 1958 li prenis sur sin la oficon de speciala komisiito por instruado en la GEFA-estraro. Li kreis la instruleterojn (Beratungsbriefe) aperintajn flanke de la DGB-Briefschule en Frankfurt/M. En aĝo de 62 jaroj li plenumis la ekzamenon de kursgvidanto kaj fariĝis komisaro de la ekzamenkomisiono de GEFA. Jam de jaroj li estas membro de UEA, SAT kaj en la Esperanto-Societo Frankfurt/M.

Kun niaj pensoj ni estas ĉe nia kolego Jäger dum lia honora tago kaj ni deziras al li, ke favora sorto donacos al li ankoraŭ longajn jarojn en bona sanstato. Kaj ni ĉiuj ĝojus, se ni povus kiel eble plej ofte vidi lin en niaj jarkunvenoj aŭ je aliaj okazoj.

GEFA-estraro

## Postkongreso en Nederlando

Sunbrilo, feste vestitaj homoj ĉie, kien mi rigardas. Estas pentekosta tago, kaj mi sidas en la trajno. Ĵus mi trapasis en Roozendaal la landlimon inter Belgio kaj Nederlando. Mia celo estas Amsterdam, kie nia ŝatata amiko Lok jam sur la kajo atendas min. Li akompanas min al la hotelo, kie la plej multaj partoprenantoj loĝas. Ili intertempe eluzis la liberan antaŭtagmezon por diversaj promenadoj laŭ ĉies gusto.

La nombro de la esperantistoj kompare al la kongresanoj en Bruselo ege reduktiĝis, kaj nun ni estas kvazaŭ unu familio. La ekskurso al la diĝoj bedaŭrinde mi ne povis partopreni, sed mi aŭdas interesajn rakontojn pri la efektivaĵo de la Delto-Plano. Ne restas al mi tempo por meditaĵoj, ĉar alia alloga ekskurso staras sur la programo.

Ni iras al la stacidomo por renkontiĝi kun la ceteraj „familianoj“. Estas 60 infanoj. Ili sekvas volonte la logantan voĉon de s-ro de Jong, kiu prenis sur sin la taskon de patro. Montriĝas, ke li faras kun ni unu el la plej belaj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo de Amsterdam. Per boato ni veturas al la albordiĝejo N.Z.H. Koffiehuus kaj de tie per du aŭtobusoj al la ĉarma loko Broek-in-Waterland. Ĉi tie ni vizitas malnovan nederlandan fromaĝfarejon. Poste ni rigardas la metiejon de ŝuofaristo, kiu permane fabrikadas el ligno la tipajn „Klumpen“. Restas kelkaj minutoj por viziti preĝejon el la 16a jarcento. Tiam ni veturas tra „Polder“-pejzaĝo al la iama insulo Marken. Jam en la jaro 1200 ĉi tie estis eta loko por fiŝkaj baleno-kaptistoj, kies posteuloj ankoraŭ nun vivas en la sama loko. Ili estas ortodoksreligiaj, kaj oni konjektas, ke ili estas grekdevenaj. Ĉiuj vestas sin per malnovaj popolkostumoj, kiuj surprizas pro kolorriĉeco, kaj ili loĝas en etaj domoj kun la sama meblaro, kiun jam uzis la antaŭuloj. La infanoj ne estas distingeblaj, ĉar ankaŭ la buboj portas robojn. Nur la ĉapeletoj de la knaboj havas specialan insignon. Ni daŭrigas la veturadon sur la digo al Monnikendam kaj poste al la dua insulo Volendam.

Kia diferenco! Ĉarmaj knabinoj kun blankaj punktufoj promenadas laŭlonge de la strando. Kontraŭe al la enloĝantoj de Marken ili ŝatas esti fotografataj. Ĉie estas gajaj homoj. En la kafejo, kiun ni vizitas, regas forta bruo, tamen tio ne ĝenas mian amikon Barks. Animtrankvile li serĉas „viktimon“ por desegni kaj trovas fiŝkaptiston, kies kapo estas tiel alloga, ke la mano kvazaŭ el si mem faras la bildon.

Kia klasika nazo sur la papero! Vivo kaj vicleco regas en la vilaĝo de tiuj belaj kaj gajaj



fiskaptistoj. Ni bedaŭras, ke la restado estas limigata, sed je la sesa atendas nin manĝaĵo en la restoracio „Tolhuis“.

Ĉu estas la abunda glaciaĵo, la amikeca atmosfero aŭ la enigma ekzercado inter geamikoj, kiuj kaŭzas la rapidan forpason de tiu bela tago? Kiel ajn — sufiĉe da kaŭzoj por resti kune la liberan vesperon. Tre volonte ni akceptas la inviton de gesinjoroj van Leeuwen kaj ĝuas la restadon en ilia ĉarma hejmo. Nur noktmeze ni atingas la hotelon. Mia ĉambro (ĉu mi skribis ĉambreon? Pardonu, kara leganto, sed eĉ ĉambreto estus troigo) ne valoras pli da tempo, taŭgas nur por dormi.

Ankaŭ la dua pentekosta tago komenciĝas per bela vetero. Jam dum la komuna matenmanĝo regas harmonio kaj gaja babilado. Precize je la 8a horo ni ekskursas per aŭtobusoj. La unua vidindaĵo estas la reĝina palaco en „Het Gooi“. Ek de la aŭtobuso la amatoraj fotoĝrafoj trovas okazon fari bildon. Sen halto ni veturas suden tra Amersfoort, Scherpenzeel kaj Otterlo al la naturparko „Hoge Veluwe“. Tie ĉi ni restas proksimume dum 2 horoj, promenas tra la arbaro aŭ babilas sidante en la suno aŭ en la ombro — laŭplaĉe. Post mallonga veturo ni atingas la restoracion „De oude Bijenkorf“ (signifas la malnova abelujo). Unue ni lunchas. Dum tri horoj ni havas

okazon ĉirkaŭrigardi en la subĉiela muzeo. Montriĝas bone konservitaj dometoj, farmbienoj kaj treege interesaj muclejoj. Ekzistas tiaj por diversaj celoj, ekz. por mueli grajnon, sekigi teron, pumpi akvon aŭ por segi lignon. Kiu havas specialan intereson pri popolkostumoj povas kontentigi la sciemon en la malgranda muzeo halo. Afabla gardisto atentigas min pri interesa poŝtmarko, kiu kvazaŭ apartenas al kolorigita poŝtkarto kun kostumoj. La posttagmezo estas treege agrabla, kaj ĉiuj denove kolektiĝas je indikita tempo kun kontentaj mienoj. Nia aŭtobuso atendas nin. Sed nia gvidisto fariĝis intertempe gvidistino, ĉar nia bedaŭrinda amiko van Leeuwen pro deĵoraj kaŭzoj estis revokita al Amsterdam. Montriĝas, ke ŝi estas ne nur ĉarma, sed ankaŭ kapabla gvidi nin. Ni ĝuas la veturon laŭlonge de Rejnborde al la restoracio „Westerbouwing“. La bone preparita vespermanĝo bongustas al ĉiuj. Ĉio estas bone organizata, kaj eĉ surprizo ne mankas. Po unu landa reprezentanto ricevas bildon de Amsterdam. Bona gesto — kaj bela memoraĵo! Nenio ĝenas la harmonion. Pro tio ni ĉiuj estas kontentaj, kiam s-ro Barks esprimas sian dankon. Ankaŭ d-ro Bácskai kaj f-ino Lemonnier dankas kun afablaj vortoj al niaj nederlandaj geamikoj por ilia modela laboro. Belaj postkongresaj tagoj finiĝas.

ek

## Senfine velditaj trakoj

### nun efektive senjuntiĝos

Proksimume la duono de ĉiuj germanaj fervojlinioj jam hodiaŭ konsistas el „senfinaj reloj“. La ritma klakado de la radaksoj, kiu rimarkiĝas je ĉiu reljunto kaj longtempe kaŭzis la karakterizan veturbruon de fervojoj, jam grandparte malaperis ĉe la ĉefaj relvojoj de la Federacia Fervojo.

Nur tie, kie la kunvelditaj reloj devas esti interrompitaj por disigi inter si la signalteknike necesajn kurento-cirkvitojn kaj do diversajn relpartojn, la relpartoj ankoraŭ ne povis esti kunligitaj senjunte. La granda eluziĝo tiuloka daŭre necesiĝis altajn riparkostojn. La multnombraj provoj trovi ankaŭ tie ekonomian solvon, nun estis sukcesaj. La kutimaj ĝis nun „spirantaj“ reljuntoj estas anstataŭeblaj ankaŭ per „nespirantaj“, do plene rigidaj kuniĝoj. Ambaŭ reloj estas firme algluataj

al intermetita izolaĵo kaj kuntenataj per firmetenaj ŝraŭboj, kiuj estas izolitaj laŭnecese. La nova izolita reljunto estas antaŭfabrikita plejparte en la laborejo, la tuta relpeco poste enveldita surloke.

Per la nova metodo, kiu dum provoj montriĝis plene taŭga, nun la lastaj breĉoj en la senfina relaro de la Federacio Fervojo malaperos. Tiel kreskos ne nur la vojaĝa komforto de la vojaĝantoj, ankaŭ la laborŝpara sukceso estas multege grava. Dum la venontaj dek jaroj la nova, plejble seneluziĝa izolita reljunto de la Federacia Fervojo helpos por ŝpári 100 milionojn da markoj je labormaterialo kaj riparkostoj.

El „Rad und Schiene“

(tradukita de Reinhard Hauptenthal)



# Neue Werbemittel

Um die Werbung neuer Mitglieder zu erleichtern und allen deutschen Eisenbahner-Esperantisten bei dieser wichtigen Aufgabe zu helfen, wird in Kürze im Sozialblatt ein umfangreicher Artikel erscheinen.

Dieser wird die wesentlichsten Argumente für den Gebrauch der Internationalen Sprache zum Ausdruck bringen. Er enthält außerdem einen kurzgefaßten Auszug aus der Sprachlehre. Der Artikel berücksichtigt die besonderen dienstlichen Umstände und die Fachsprache der Eisenbahner.

Trilanda renkontiĝo en

## Lindaŭ

3a — 4a de oktobro 1964

La pitoreska insularbo Lindaŭ atendas kiel lastjare multnombrian partoprenon al tiu renkontiĝo. Varia programo: amuza vespero, urbgvidado, ekskursoj, ŝipveturado, prelego, diservoj por ambaŭ konfesioj. Programoj kun aliĝiloj haveblaj per: s-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, Romanshorn, Svislando aŭ s-ro A. Stamm, Feldgraben 26, Dornbirn, Aŭstrio.

## Nova literaturo

Tri novaj fabeloj de Andersen ĝojigas la amikojn de la konata dana poeto. Temas pri „La novaj vestoj de la imperiestro“, „Hans-fuŝulo“ kaj „Estas tute certe“. 24 kolorilustraĵoj de Gustav Hjorthund respegulas la humure-spritan enhavon. Titolo ne indikita.

48 paĝoj, 21 X 27 cm, bindita, 6,— DM. Mendo per: Eldonejo KOKO, Kolby Kaas, Danlando

Bazajn konsiderojn pri objektiva vivkoncepto volas doni nova broŝuro bildita kaj tipografe bone aspekta. Ĝi okupiĝas i. a. pri la reenkarniĝo.

„Objektiva vivkoncepto“ de Ib Schleicher, 28 paĝoj, senkoste havebla per: La Spirtsencia Instituto De Martinus, Mariendalsvej 94 - 96, Kopenhago F, Danlando

Der gleiche Text wird in Form eines vierseitigen Flugblattes voraussichtlich im September erscheinen und über die Bezirksbeauftragten allen Gruppen zugehen. Alle Mitglieder werden gebeten, für die Herbsarbeit, für die Vorbereitung von Kursen und für die Einzelwerbung dieses Flugblatt zu benutzen. Es erfüllt nur dann seinen Zweck, wenn es nicht wahllos, sondern gezielt verwendet wird.

Der Vorstand

„La Vojo al Mondpaco“ de Gunnar Rugland, 40 paĝoj, multoblita, 3,90 DM „Latentaj nombrofenomenoj en la Sankta Skribo“ de Gunnar Rugland, 2,10 DM

Adreso: Gunnar Rugland ĉe Rönell, Horgsgatan 89 II, Stockholm, Svedio

## El la grupoj

Frankfurt. Pri la multnombraj aranĝoj dum la IFEF-kongreso en Bruselo raportis antaŭ malgranda aŭskultantaro nia fervora GEFA-estrarano Ritter-spach. Ankoraŭfoje aperis sur la ekrano en fresaj koloroj de la printempo la belaj de la kongresurbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kien la kongresanoj ekskursis. Oni rekonis longjarajn geamikojn, kaj oni eĉ aŭdis fragmentojn el la surbendigitaj alparoloj kaj muzikajoj. Entute bonŝukeca aranĝo.

Weiden. Proksime de la ĉeĥoslavoka landlimo, en Polstermühle ĉe Eslern, situas feria hejmo de la societo „Berlinhilfsverein“ por infanoj de Berlin. La mastrino de la domo estas s-ino Grosser, malnova samideanino el Berlin. Jam la duan sezonon ŝi zorgas tie por la junaj gastoj, kiuj malproksime de grandurbaj danĝeroj povas refreŝigi inter verdaj arbaroj kaj herbejoj.

S-ino Grosser sciis jam delonge, ke en Weiden ekzistas vigla Esperanto-grupo. Interkonsente kun la „reĝo“ de la grupo oni aranĝis malgrandan renkonton en la bela loko Polstermühle. La loko situas rave inter arbaroj, laĝetoj kaj montetoj. Per tri aŭtomobiloj faris posttagmezan ekskurson parto el la klubanoj de Weiden la 7an de junio. S-ino Grosser akceptis nin kun granda ĝojo. Ankaŭ unu el la tri filinoj flegas de multaj jaroj viglan kontakton per la internacia lingvo. Ni konatiĝis, babilis, naĝis, pilkoladis, trinkis bonan kafon, kaj eĉ bongusta kuko ne mankis. Tro rapide pasis la belaj horoj, kiujn ni povis travivi en vera samideana sfero. Ni adiaŭis, ne sen interkonsenti daton por plua kunveno, sed tiam por tuttaga ekskurso.

En la kadro de niaj ĉiusemajnaj grupvesperoj ankaŭ okazis lumbild-vespero pri la IFEF-kongreso.

Richard König

## Ĉu la trajno veturas al Pavia?

Komenciĝis en trajno al Pavia. Kiam Derossi eniris la kupeon, li rimarkis bone nutritan sinjoron, kiu tenis sur la gutoj anseron buĉitan, malbone pakitan kaj minimume sep kilogramojn pezan. La sinjoro estis tre babilema, komencis konversacion kun Derossi kaj prezentis sin: „Gino Carsi, fervoja inspektoro.“

Sed kion do valoris por sinjoro Derossi nomo kaj profesio de la fremdulo, kiam lia rigardo avido celis la bone grasigintan anseron, lia cerbo laboris febre, kaj subite li havis planon. Li forlasis la kupeon kaj serĉis la trajnestron.

„Pardonu, ĉu tiu trajno veturas al Pavia?“ „li demandis lin trovinte.

„Jes“, respondis la oficisto ĝentile kaj pluen iris.

Derossi restis malantaŭ li.

„Ĉu vi estas tute certa, ke ĉi tiu trajno veturas al Pavia?“

„Kompreneble“, venis la respondo nun jam iomete bruska.

„Ĉu vi povas garanti al mi, ke ĉi tiu trajno veturas al Pavia?“

Derossi demandis senkonfuzo.

Ĉifoje li ne atendis la respondon, sed rapide rekuris en la kupeon.

„Efektive! La malĝentileco de la trajnestroj troigas ĉiujn limojn de la konvenebleco. Oni enkarcerigu lin pro tio“, li ekisultis.

Carsi, la viro kun la ansero, admire aŭskultis lin.

„Tio ne estas vera“, li diris fine same ekscitita. Vus niaj trajnestroj elstaras pro aparta ĝentileco. Derossi akir ridis.

„Ni do faru provon. Tuj, kiam la trajnestro kontrolas la biletojn, mi pruvos al vi, ke li estas impertinenta.“

„Vi eraras“, kriis sinjoro Carsi. „Mian anseron mi volas veti, se tio estos vera.“

„Akceptite“, diris Derossi kaj ruze alrigardis la inspektoron. Post kelkaj minutoj la pordo malfermiĝis. La trajnestro aperis.

„Biletojn, mi petas.“

Derossi donis sian bileton kaj la lasta, antaŭklinis sin kaj poste demandis: „Ĉu tiu ĉi trajno veturas al Pavia?“

„Iru al la diablo“, vokis la trajnestro kaj batfermis furioze la pordon.

La bone nutrita ansero ŝanĝis sian posedanton.

Filodoro

(Traduk. de Rudolf Hönemann)



## Ni legis en . . .

**BULTENO** de la Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj enhavas (en n-ro 1) ampleksan superrigardon pri la landaj ŝtatformoj dum la pasinta jaro 1963.

Die **BUNDESBAHNMITTEILUNGEN** berichten in Nr. 21 unter der Überschrift „Fahrplan auf Esperanto“ über den IFEF-Kongreß in Brüssel.

Das offizielle Organ **Die Bundesbahn** enthält in Nr. 11 einen ausführlichen Bericht über dasselbe Thema.

**DEFA-Bulteno** de la Dana Esperantista Fervojista Asocio raportas (en junio) kiel unua organo pri la IFEF-kongreso.

**EL POPOLA ĈINIO**, plaĉa laŭ aspekto, entenas (en n-ro 3) interesan raporton de okcidenta vizitintino kaj novaĵojn pri la Esperanto-instruado en la lando.

**Esperanto en Skotlando** publicas en la printempa eldono tre amuzan rakonton „Aprilo“.

**HEROLDO** elstarigas (en n-ro 10) la 16an IFEF-kongreson kiel la plejgrandan esperantistan fakkongreson.

**HOMO KAJ KOSMO**, eldonita en Jugoslavio, scipovas (en n-ro 4/63) modele daŭrigi sian karakteron kiel populara naturscienca revuo. Leginda estas la artikolo „La mortigaj radioj“.

En **HUNGARA FERVOJISTA MONDO** aperas (en n-ro 1) la artikolo „La pensantaj maŝinoj helpas ankaŭ la fervojan laboron“.

**INTERSTENO**, eldonita de la Tutmonda Intersteno-Asocio, varbas (en aprilo) iom kuriozo per la enkonduko de tutmonda stenografo.

**JEN**, organo de la Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj, anoncas (en majo), ke la urbo Stoke-on-Trent nomigos krom la „Esperanto-way“ alian straton „Zamenhof-street“.

**JUNULARA INFORMA SERVO**, raportas (en n-ro 2) pri multnombraj detaloj el la junulara movado.

**La Fervojisto**, organo de la franca IFEF-sekcio, prezentas (en junio) per la FEFA-prezidanto interesan analizon pri la pasinta IFEF-kongreso.

**La Gazeto**, eldonita de la franca esperantistaro, demonstras (en majo) post longa paŭzo sian aktualecon.

**La Socialisto**, reeldonita organo de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, dediĉas (en junio) laŭdon al la esperantigita prospekto de la Germana Federacia Fervojto.

**La Vorto** nomigas esperantigita revuo por intensa kristanismo laŭ la pura vorto de dio. Eldonanto: Lorberg-sekto.

**Paŝon post Paŝo**, informilo de la grupo en Svängsta (Svedio), komencas (en n-ro 3) artikolserion „Mia hejma regiono“.

**Die Westdeutsche Zeitung** bringt am 19. 6. unter der Überschrift „Esperanto ihre zweite Sprache“ einen bilderten Bericht über den IFEF-Kongreß und über die Tätigkeit der Eisenbahnergruppe Rheydt.

**THE WORKER ESPERANTIST**, eldonita de la brita laboristaro, kritikas (en junio) la trouzon de Esperanto-longigoj.

W. B.

„ . . . donu nutraĵon  
al la birdo

„ . . . kaj akvon  
al la floroj

„ . . . ne forgesu forviŝi  
la polvon

„ . . . kaj forportu la  
rubaĵon

„ . . . kaj . . . “

El

„BUNDESBAHN-  
MITTEILUNGEN“



Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.